LITERATURO


1. Besedovsky HO kaj aliaj (1985). *J Immunol* 135(2) Suppl: 750-754
2. Blalock JE, Smith EM (1985). *Fed Proc* 44(1) Parto 1: 108-111
3. Brill GE (1984). *Izuĉenije i modelirovanije infekcionnogo processa - Riga*: 138-141
4. Hadden JW (1983). *Immunoregulation Proc Workshop*: 201-230
5. Lappin D, Whaley K (1982). *Clin Exp Immunol* 47: 606-612
6. Rjabĉinskaja LA, Lazareva DN (1986). *Antibiotiki i med biotehnol* 31: 606-610
7. Roszman TL, Brooks WH (1985). *J Neuroimmunol* 10: 59-69
8. Ŝigajev NI (1988). *MIR* 13: 4-7
9. Tumasjan KS kaj aliaj (1988). *Farmakol i toksikol* 5: 49-53
10. Vogelsang GD, Piercey MF (1982). *Eur J Pharmacol* 110: 267-269
11. Zak VI, Galcev AP (1982). *Aktualnije voprosi fiziologii sistemi krovoobraŝĉenija*: 89-90
12. Zubic TM kaj aliaj (1984). *Izuĉenije i modelirovanije infekcionnogo processa - Riga*: 25-27


Adreso de la aŭtoro:
Nicolaj I. ŜIGAJEV
Baŝkiria Medicina Instituto
A/K 13
GUS - RU 450014 Ufa
Baŝkortostan



# LA FORMADO DE FRUPOLITIKAJ RILATOJ EN LA PROTO-BAKTRIA CIVILIZACIO DE LA BRONZA EPOKO

VLADIMIR I. IONESOV (RU)

La esplorado de la arkeologiaj monumentoj de la SAPALLI-kulturo en suda Uzbekistano montris, ke la plej granda fruurbeca centro de la *Proto-Baktria* civilizacio estis Gharkutan (rigardu SR, Vol.43 (1992)(1), p.3-8). Gharkutan estis ne nur la plej granda chefurba centro de la vasta regiono, sed ankau unika sociala organismo, interne de kiu okazadis historiaj procesoj de struktura transiro de primitiveco al la frua shtateco. Chi tiun epokfaran historian transiron sukcese karakterizis I. L. ANDREJEV: „La transira shtupo estas epoko de la paralela kunekzistado (kutime je diversaj niveloj, je diversaj etapoj de la vivo de la socio) de du principe kontrauaj sistemoj, lau la fonto kaj perspektivoj de la evoluo, kaj samtempe genetike juntighantaj, najbaraj interagantaj strukturoj kiel principoj de socia regulado kaj sociala kontrolo“ (1985, p. 194).

Unuafoje al la problemo de la socia evoluo de Proto-Baktria civilizacio adresis sin A. A. ASKAROV dum analizo de la arkitektura-planeca kaj enteriga kompleksoj de SAPALLITEPA (1973, p. 130-139). Post la kompleta malkovro de la loghloko kaj eltrovo de la tombejo Gharkutan 4A li konstatis, ke la kulturo Sapalli "ghenerale estis en la lasta fazo de evoluo de primitiveca sociordo, en la shtupo antauiranta al la epoko de la milita

demokratio " (Askarov, 1977, p. 144).
Postsekve dank' al la ghustigita kronologio de SAPALLI-kulturo la uzbekaj arkeologoj proponis ekzameni du fruajn etapojn de la kulturo (SAPALLITEPA kaj Gharkutan) kiel periodon de malformigho de primitiveca sistemo, kaj du malfruajn etapojn (KUZALI kaj MOLALI) kiel periodon de formigho de fruaj formoj de klasaj rilatoj (ASKAROV, ABDULAJEV, 1983, p. 55).

En najbaraj nord-afganaj arkeologiaj kompleksoj de la Bronza epoko (DASHLI I, III) V. I. SARIANIDI vidas ateston "... de longe enprofundighinta procezo de la sociala diferencigho, kiam la tuta socia vivo de oazo-anoj reglamentighis per elstarighinta intertavolo de la loka socio" (1976, p. 84).

Thushante la politikan evoluon de la nenomadaj socioj de antikva Baktrio, V. M. MASSON karakterizis ilin kiel "socion de kompleksa sociala strukturo, en kiu la instituigo de la sekulara potenco akcelas la kreskadon de la rolo de la administraj kaj militaj funkcionoj de la registoj, pro la kulturigo de novaj teritorioj kaj intensigho de intertribaj kaj eble ankau de interetnaj kolizioj " (1984, p. 62).

La analizo de la enterigaj kompleksoj de Gharkutan, entreprenita de ni, en la kunteksto kun ghia urbaneca evoluo ebligas al ni fari novajn konkretajn konkludojn pri la procezo de la genezo kaj evoluo de frupolitikaj rilatoj en la Proto-Baktria civilizacio.

La evoluo de la sociala sistemo de la kulturo SAPALLI reflektas la komunan historian tendencon de rompo de gent-tribaj strukturoj kaj de embriigho de la primaraj politikaj institucioj, ligitaj kun
a) progresanta dispartigho de gentoj kaj ilia miksigho kaj
b) plifortighintaj kontaktoj kun la ekstera mondo sekve de alfluo de nova loghantaro ( ISTORIJA PERVOBYTNOGO OBSHCHESTVA, 1988, p. 246).



Kiel videblas el la historia topografio de Gharkutan, la triba dispartigho de logh-mastrumaj kvartaloj estas laugrade anstatauata per la sociala-teritoria disigho (apartighintaj ekonomia akumulajhoj, templo, palaco, loghkvartaloj). La enterigaj kompleksoj transformighas el komun-familiaj, kvartalaj tombejoj (etapoj SAPALLI kaj Gharkutan I, 1750 - 1550 a.K.) en apartighintajn gentajn (etapoj Gharkutan II, KUZALI kaj MOLALI-BUSTAN, 1550 - 950 a. K.) kaj subgentajn nekropolojn (etapoj malfru-KUZALI kaj MOLALI - BUSTAN, 1250 - 950 a. K.) (Bildo 1).

La evoluo de la produktadaj fortoj kaj la kresko de la loghantaro komplikigis la ekonomiajn kaj socialajn ligojn en la komunumo, kio postulis principe novan sistemon de la administrado. Ekzisto de regula aldona produkto en la socio ebligis apartigi por chi tiu celo la specialan privilegian administran aparaton en la fino de la ghazkutana etapo. Chi tiu aparato, probable, konsistis el la plejaghuloj de la plej deven-nobla bonhavaj membroj de la socio (genta aristokrataro). Ne hazarde ghuste en chi tiu tempo en la urbeca sistemo de Gharkutan aperas novaj monumentaj kreajhoj: palaco kaj templo de fajro. (Bildo 4).

Chio chi estas akompanata de kreado de produktantaj ceramikaj manufakturoj kiel sekvo de la evoluinta teknologio kaj de kreado de altkvalitaj potfaraj produktejoj (Gharkutan-monteto 1, BUSTAN-4) kaj ankau de la kreado de speciala apudtempla metalfanda kaj metalprilabora prodktado (metiejoj). Rezulte, pligrandighis la kvanto de tomboj kun metalaj ajhoj (ghis 41,8%) kaj ritaj oferdonoj de bestoj (ghis 23, 8%) en la etapo KUZALI).

La institucio de la supera potenco efektivighis en la gharkutana socio ne per rekta ekspluatado de la ordinaraj komunumanoj, sed per monopoligo fare de gent-triba aristokrataro el la plej gravaj sociaj funkcioj kaj per perfektigo de la organizado de la produktado rilate al la redistribua sistemo. Rezulte, la pli granda

parto de regula aldona produktado alvenis en la manojn de la burokrata aparato.

Lau la datumoj de la enterigaj ritoj ni ne povas paroli pri konfiskado de la bazaj produktiloj far' de genttriba aristokrataro. Por irigacia ekonomio, tiu chi varianto de la sociala evoluo estus estinta la plej malkonvena (PAVLENKO, 1989, p. 262 - 263). La socialan kaj posedajhan diferencigon de la Proto - Baktria socio evidente eksplikighas per neegalvalora aliro de diversaj hierarkiaj sociaj grupoj al la bazaj produktadaj fontoj de la komunumo.

Diversaj grupoj de la tomboj reflektas multshtupan socialan diferencighon de la malfru-gharkutana komunumo, en kiu oni povas distingi sekvajn tavolojn:

1) senrajtaj, dependaj membroj de la socio (kaptitoj, shuldantoj, fremduloj, kaj ankau, probable, fizike neplenvaloraj individuoj, frauloj, seninfanuloj k.a.),

2) ordinaraj plenrajtaj komunumanoj (bazaj produktantoj),

3) bonhavaj plenrajtoj komunumanoj (kvalifikitaj metiistoj, spertaj batalantoj kaj iliaj multinfanaj edzinoj, probable profetistoj, sorchistoj, kuracistoj , personoj proksimaj al la agado en la templo,

4) genta aristokrataro (gvidantoj, idolpastroj ).

Plifortikigho de la socialaj oficoj kaj tavolaj privilegioj estis nur la unua granda pasho al instituigo de la sociala malegaleco (LENSKY, 1966, p. 132).

Laugrade disiga izoligho de la publika potenco for de la baza loghantaro forte subfosis la konfidon de la popolo kaj alkondukis grandan socio-politikan krizon. La aperinta degrado de la ekonomiaj strukturoj en la fina stadio de la kulturo estis laulegha rezulto unue de nekapableco de la superstrukturaj frupolitikaj mekanismoj efektive realigi la administradon de la ekonomia vivo en la kadro de la iama primitiv-egaliga sistemo kaj due de la maldeziro de la ordinaraj produkantoj toleri la kreskantajn



ekonomiajn malfacilajhojn kaj la premon de la administra-burokrata kaj idolpastra korporacioj.

La rompo de mondkonceptaj principoj rivelighis en la erozio de la relative ordigita tradicia religia ideologio. Plej bone tio videblas en la enteriga rito de la lasta etapo de Gharkutan. La karaktera trajto de la enterigaj kompleksoj de la etapo MOLALI - BUSTAN estis la kunekzistado de diversaj variantoj de la enterigaj ritoj . En la gharkutana etapo ekzistis nur 6 variantoj de la enteriga rito, sed en la stadio BUSTAN ekzistas jam 14 variantoj de rito (tomboj de dismembrigita skeleto de la homo, kruchaj tomboj, tomboj de bestoj, cenotafoj, tomboj de homoj en pozo sidanta au surdorsa). Krom tio, en la fina stadio aperas la nova maniero de kremacio-entombigo. (Bildo 2) (Bildo 3) (Bildo 4)

Disfalo de la etno-kultura unueco che la portantoj de kulturo SAPALLI rimarkeblas ankau en la enteriga ilaro (modlitaj potoj kun geometria ornamento k.a.) (Bildo 7) kaj, kio estas aparte grava, en la antropologia konsisto de la loghantaro.

Aliflanke, la kreskado de redistribu-ekonomia ekspluatado sekvigis la polarigon de la socia vivo kaj amasan mizerighon de la ordinaraj komunumanoj (70,5 % da tomboj de la fina stadio de Gharkutan havas tre malrichan sortimenton de la enterigaj oferdonoj au ne havas ghin entute). Redistribuo de la materiaj valoroj kaj parazitado de la burokratia aparato, evidente, senigas bazajn produktantojn de la ekonomia stimuloj. Margheneco de la socia pozicio de la bazaj produktantoj devigis ilin kontraustari la premadon de la nova aristokrataro per intensa reanimigo de la arkaismaj tradicioj por protekti la tradician kulturon kontrau la neevitebla historia modifigho. En la enteriga rito denove aperas la ceramikujaj kaj paraj tomboj, tipaj por la fruaj etapoj de la SAPALLI-kulturo. Samtempe revivighas rilate al la enteriga ilaro la antauaj Sapalli-Gharkutanaj atributoj: shtonaj amuletoj, bronzaj

kosmetikaj flakonoj , ceramikaj tekruchoj, vazoj kun altaj kaj maldikaj piedoj k.a. (Bildo 6).

Ekonomia malstabiligho kaj la plifortighinta sociala konflikto estis stimulata ankau per la kreskanta milita danghero, plej probable, flanke de la brutbredistaj triboj de la stepa Nordo (ASKAROV, 1989). Progresanta evoluo de la brutbredado, armilfarado, senprecedenca disvastigho de cenotafoj k.a. en la SAPALLI-kulturo estas la arkeologia atesto pri tio.

Historia destino de la Proto-Baktria civilizacio estis determinata komence de la 1-a jm a. K. kauze de la epokfara interna krizo pro ekstera stimuligo . Malfortighinte sekve de la socialaj konfliktoj, la ekonomia organismo de Gharkutan jam ne povis rezisti (kaj des malpli haltigi) la plifortighantan agresan movadon de la stepaj brutbredistoj kaj, plej probalble, farighis la viktimo de konkero . Iukaze, la loghantaro forlasis Gharkutan kaj la tombojn de siaj antauuloj kaj ankau rezignis de siaj tradiciaj enterigaj ritoj. Kio do devigis la komunumon agi ghuste tiel?

Estas konate, ke granda kvanto de la Gharkutanaj tomboj estis prirabitaj kaj detruitaj ankorau en la antikva tempo. Evidente, forlaso kaj malhonorigo de la tomboj okazis preskau samtempe. Povas esti, ke post la invado de la stepaj brutbredistoj en Gharkutan jam komencighis la detruo de la suragraj “sanktejoj“. Interpretado por tia detruo kaj malhonorigo de la tomboj de la gharkutanaj antauuloj povas esti la rivelo, ke en la tomboj, lau arkaika konscio, estas konservata la “forto“ de la tribo. Vidu la sciigon, ke la okcidentaj skitoj estinte konkeritaj de la persoj ne konsideris sin venkitoj tiom longe kiam la tomboj de iliaj antauuloj restis netushitaj de la konkerintoj (HERODOT, p. 218 - 219). Ekzistas kialoj supozi , ke ankau la gharkutanaj tombejoj estis intence detruitaj de barbaroj ne tiom cele al prirabo kiom cele al malhonorigo, neniigo de la spiritoj radikoj de la konkerita popolo,



por sufoki ghian volon kaj por chiam apartigi ghin de ghia pasinteco. Por tiu chi supozo ni havas multnombrajn nerektajn atestojn. Ekzemple, estas signifa kvanto da tomboj, en kiuj chiuj enterigaj oferdonoj (ritaj atributoj, instrumentaro) trovighas en surloka pozicio malgrau evidentaj spuroj de elterigo kaj malhonorigo de la korpo de la mortinto. En la tombo N 258 (Gharkutan - 4B) trovighis forte rompita skeleto de viro (la kranio che la piedoj, pelvaj ostoj khaoze disjhetitaj), dum 9 grandaj ceramikaj ujoj, ses bronzaj ajhoj kaj ankau skeleto de shafo ne havas ech etajn signojn de malordo kaj translokigo, sed restis surloke. La tombo N 268 montras la skeleton de virino ankorau pli multe detruita (la ostoj estas disjhetitaj tra la tuta tombo), sed samtempe absolute netushitaj de la elterigantoj restis la tuta enterigita atributaro: kompleto da bronzaj kaj shtonaj ritaj ajhoj kaj arigilaj ujoj. Evidente, similaj faktoj parolas ne pri rezultoj de prirabo, sed pri postsekvoj de malhonorigo, pri la intenca fimokado kontrau la korpoj de la mortintoj. Lige kun tio rimarkindas, ke la malhonorigo preskau ne tujhis cenotafojn, t. e. falsajn tombojn, kun enterigitaj oferdonoj, sed sen mortinto. Tia elektado evidente atestas, ke la tomboj iel distingighis lau la surfaco . Alimaniere malfacilas klarigi kiel la malsanktiguloj sukcesis tiel senerare malkovri tombojn kun homaj restajhoj kaj ellasi la cenotafojn.

La ekzemplo de intenca malhonorigo de la tomboj estas la tombejo el la skita tempo en la centro de TUVA, kie la skeletoj de mortintoj estis dishakitaj kaj poste ree supershutitaj per la shtonoj, dum la valoraj oroj kaj bronzaj ajhoj tute ne estis elprenitaj el la tomboj. Ekzistas la versio, ke la almigrantaj okupintoj la teritorion tiamaniere faris “malutiligebla“ rilate al la - ech mortintaj - malamikoj (GRACH, 1975, p. 178).

Interesajn faktojn ni povas trovi ankau en la poemo „ILIADO“ de HOMER. Tie oni intence kremaciis la ahhean gvidanton Patroklo

en la fremda lando de la trojanoj malgrau tio, ke la grekaj triboj en tiu historia periodo praktikis la riton de entombigo. La ahheaj herooj prunteprenis tiun chi praktikon en la ekstrema situacio kiel decan manieron enterigi siajn mortintojn en fremda lando, defendante ilin kontrau ebla malhonorigo flanke de la malamikoj (lau la opinio de GERNI, 1987, p. 150).

Vershajne, ghuste pro tio okazis la transiro al la kremacio de la mortintoj ankau en Norda Baktrio en la periodo de interetnaj kunpushighoj kaj de disfalo de la Proto-Baktria civilizacio.

Transformigho de la sociaj rilatoj kaj kulturaj valoroj de la antikvaj terkulturantaj triboj estis akompanata unuflanke de certa degrado de la antaua sociekonomia bazo kaj aliflanke de la interpenetrado de la nomada agresemo kaj de la propra nenomada malshancelebleco. Tio, kio ne sufichis al la nenomadaj terkulturistoj estis alportita de la nomadaj brutbredistoj; tion, kio ne sufichis al la nomadaj brutbredistoj, tiuj trovis che la nenomadaj terkulturistoj. Kompreneble tia transformigho ne povas okazi sen turmentaj bataloj kaj adaptighstrechoj de la nomada kaj malnomada sistemoj. Tamen, la post-gharkutana epoko montris, ke, finfine "lau la nediskutebla legho de la historio, konkerintaj barbaroj mem estas konkerataj de la pli alta civilizacio de la popoloj konkeritaj de ili" (MARX, p. 225).

La rezultoj de la kultura infiltrado en la jaroj 900 - 750 a. K. klare elmontrighis en la monumenta arkitekturo, ceramiko kaj ankau en la nova sistemo de loghigo. La antauaj grandaj fruurbecaj centroj kun komplekse diferencigita strukturo anstatauighas per ege fortikigitaj citadelaj loghlokoj kun densa konstruado kaj per citadeloj sur altaj platformoj. Tiuj chi loghlokoj koncentris la funkciojn de la administraj-politikaj centroj kaj rifughejoj de la loghantoj de la oazoj (KUCHUKTEPE, KYZYLTEPE, BANDYHHAN-2, TALASHKAN, GHANDAV'LJATTEPE k.a. en



Norda Baktrio kaj TILLJATEPE, ALTYN -1, ALTY N -10 k.a. en Suda Baktrio).

La militigan destinon de la citadelaj loghlokoj de la frufera epoko atestas multnombraj embrazuroj en la muroj (KYZYLTEPE, TALASHKAN), la potenca citadela fortikajho, oftaj eltrovajhoj de bronzaj sagoj kaj shtonaj kuglegoj. Che la militigo de la antikva Baktria socio la grava rolo estas atribuata al la kavalerio. Pro tio rapide ekestis la evoluo de la chevalbredado.

La sinkretismo de la stepaj kaj terkulturaj tradicioj reflektighis ankau en kunekzistado de potista kaj modlita vazaro. Krom tio laugrade pliighis la porcio de la potista ceramiko. El chio videblas, ke la pli evoluinta nenomada-terkultura ekonomio konservis sian prioritaton en la sistemo de la socia produktado, dum la brutbreda kulturo subigis al si la sferojn de la ideologio, inkluzive la religian kaj enterigan agadon.

Do, la faritaj konkludoj surbaze de la historia-arkeologia analizo de la Proto-Baktriaj monumentoj markas nur kelkajn chefajn punktojn de la genezo de la antikva-baktria shtateco kaj neniel pretendas definitivan kaj gheneraligan interpretadon de tiu chi granda historia problemo.

## LITERATURO

1. ANDREJEV I.L. RUKOPISNAYA STRANICA ISTORII MARKSIZMA - Moskva, 1985, 272 p.
2. ASKAROV A.A. SAPALLITERA - Tashkent,1973, 172 p.
3. ASKAROV, A.A. DREVNEZEMLEDELCHESKAJA KULTURA EPOCHHI BRONZY JUGA UZBEKISTANA - Alma-Ata, 1989, p.158-166.

Scienca Revuo Vol. 45 (1994)(2) - 165


4. ASKAROV A.A. STEPNOJ KOMPONENT V OSEDLYHH KOMPLEKSAHH BAKTRII I VOPROSY EGO INTERPRETA-CII. - VZAIMODEJSTVIE KOCHEVYHH KULTUR I DREVNIHH CIVILIZACIY. - ALMA-ATA,1989, p. 158-166.
5. ASKAROY A.A. ABDULLAEV B. GHARKUTAN. - TASHKENT, 1983, 120 p.
6. GERNI O. HHETTY. - MOSKVA, 1987, 234 p.
7. HERODOT. KNIGA 4, MELPOMENA. -ISTORIA V 9 KN. - MOSKVA, 1972, 599 p.
8. GRACH A.D. PRINCIPY I METODIKA ISTORIKO-ARHHED-LOGICHESKOI REKONSTRUKCII FORM SOCIALNOGO STROJA.- SOCIALNAJA ISTORIA NARODOV AZII- MOSKVA, 1975, p.158-182.
9. IONESOV V. KULTURO KAJ SCIO DE NORDA BAKTRIO.- SCIENCA REVUO, VOL. 43 (1992) (I)- 160, ZüRICH, p. 3-10.
10. ISTORIA PERVOBYTNOGO OBSHCHESTVA. EPOHHA KLASSOOB- RAZOVANIJA.- MOSKVA, 1988, 366 p.
11. LENSKI G.E. POWER AND PRIVILEGE, A THEORY OF SOCIAL STRATIFICATION, N 4 ETC., 1966.
12. MARX K. BUDUSHCHIE REZULTATY BRITANSKOGO VLADYCHESTVA V INDII.- MARX K., ENGELS F.SOCHI-NENIJA. TOM 9.- MOSKVA, 1957, p. 224-230.
13. MASSON V.M. FORMIROVANIE DREVNIHH CIVILZACIJ V SREDNEY AZII I INDOSTANE.- DREVNIE KULTURY SREDNEY AZII I INDII - LENINGRAD, 1984, p. 56-7.
14. PAVLENKO YU.V. RANNEKLASSOVOE OBSHCHESTVO: GENEZIS I PUTI RAZVITIJA- KIEV, 1989, 288 p.
15. SARIANIDI V.I. ISSLEDOVANIJA PAMJATNIKOV DASHLINS- KOGO OAZISA - DREVNJAJA BAKTRIJA- MOSKVA, 1976, p. 21-86.





Scienca Revuo Vol. 45 (1994)(2) - 165

La autoro estas supera scienca esploristo de la Instituto pri Arkeologio che la Akademio de Sciencoj de Uzbekistano. Nuntempe li lekcias en la Instituto de Artoj kaj Kulturo (Samara, Ruslando).

Kontaktadresoj de la autoro:


D-ro VLADIMIR I. IONESOV
SHAROF RASHIDOV KUCHASI 53
GUS / UZ - 703000 SAMARKAND
RESPUBLIKO UZBEKISTANO

D-ro VLADIMIR I. IONESOV
P.O. BOX 9406
GUS / RU - 443115 SAMARA
RUSLANDO





BILDO 1. Dinamiko de la evoluo de la enterigaj kompleksoj de Gharkutan. En la historia topografio oni distingas 3 etapojn:
I - tombejoj situantaj interne de la loghloko en diversaj logh-mastrumaj masivoj sub la plankoj kaj muroj de la konstruajhoj (etapoj SAPALLITEPA kaj Gharkutan I);
II - tombejoj elportitaj ekster la limojn de la loghloko kaj konstruitaj sur la apartaj montetoj sude kaj okcidente de Gharkutan (etapoj Gharkutan II, KUZALI, MOLALI - BUSTAN);
III - tombejoj lokigitaj sur la Bustanoj montetoj vastiginte la malnovajn gharkutanajn nekropolojn (etapoj malfrua Kuzali kaj Molali -Bustan).







BILDO 2. Tipologia klasifiko de la antikvaj tomboj de la Sapalli-kulturo (Proto-Baktria civilizacio) lau la kronologiaj etapoj.




BILDO 3. Kronologia klasifiko de la argilaj ujoj de la Sapalli-kulturo.







BILDO 4. Gharkutana templo de fajro (D) kaj la ritaj variajhoj en la imita rito de la Sapalli-kulturo.

A - argilaj figuretoj de la homo kaj aliaj atributoj el la cenotafoj;


B - bronzaj miniaturaj votaj enterigaj ujoj;

C - tipoj de la imita enteriga rito (tomboj de la shafoj, pupo, krucha tombo, dismembrigita skeleto de la homo).




BILDO 5. Ceramiko de la bustana tempo (1050-950 a. K.) el la gharkutanaj tombejoj.





BILDO 6. Ceramikaj ujoj el tombo N 165 (Gh-4B) de la bustana tempo, kiuj kopias la formojn de la frua gharkutana etapo (la fenomeno de la renaskigho de la arkaikaj tradicioj).



BILDO 7. Arkeologiaj ajhoj de la fina stadio, kiuj reflektas la influojn de la tradicioj de la stepaj brutbredistaj kulturoj.